

Sud-Rejna Kuriero

Oktobro
2011

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°44

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, gesamideanoj, kaj legantoj,

Jam komenciĝas la nova lerno-jaro kaj samokaze pluraj aktivaĵoj. Tamen en tiu numero aperas ĉefe raportoj pri pasintaj eventoj okazintaj en Esperantio.

En Danio okazis ĉi-jare la Universala Kongreso, pri ĝi raportas Roberto. La Itala Kongreso en Torino havis tre bonan sukceson, pri ĝi raportas Liba, kaj ankaŭ pri postkongreso en Hercegovino.

Komence de oktobro Katalunio allogis pro internacia semajno en ankoraŭ somera vetero.

Intertempe ekfunkciis la kursoj en Espace 110 kaj en Village-Neuf kaj ankaŭ la lundaj kunvenoj, nomataj "Fadenoj".

La 19/20ajn de novembro nia asocio havos budon en ekologia foiro de Ungersheim.

En decembro la Bazelo Grupo organizos la Zamenof-feston en Weil am Rhein.

Dume jam estas informoj pri nia printempa staĝo organizita de nia asocio kun ĉefa prizorganto Bertrand Wick.

André Grossmann



Nia ekskurso iros sabate la 27.08.2011 al la Chaux-de-fonds, kie ni festos la 80 jarojn de Claude Gacond.

Bonvolu aliĝi al tiu renkontiĝo rekte ĉe SES, ĉar la organizantoj devas antaŭ-mendi la menuon.

(Sed bonvolu diri ankaŭ al mi por ke ni povu organizi la transporton).

22.09.2011 Monata kunveno en nia salono

27.10.2011 Ni parolos pri la ferioj

24.11.2011 Programo

10.12.2011 Zamenhofa festo 2011, organizita
de la Bazela grupo en Weil am Rhein
(informoj sur paĝoj 4 kaj 5)

Nicole Bérout

Francophonie und Globalisierung ! (Teil 4 von 4)

Andere perverse Ergebnisse, die auf dem Verzicht auf andere Sprachen beruhen, sind : die intellektuelle Alienation durch Vereinfachung der Argumentation, weil man das Englische nicht wie ein Native Speaker beherrscht.

Die Inbeschlagnahme der Ergebnisse durch die Anglo-Amerikaner (z.B. hatte Duschene das penicillium glaucum vor Fleming entdeckt, de Martinville hatte den ersten Plattenspieler, Charles-Cros das erste Tonband vor Edison gebaut, usw...).

Außerdem bewirkt das : das Entstellen der Welt Darstellungen (die Tendenz nur anglo-amerikanische oder von ihnen inspirierte Studien bietet ein falsches Bild der chinesischen, japanischen, indischen, usw... Realitäten) und die anglo-amerikanische Beschlagnahme auf das wissenschaftliche Verlagswesen, die Plünderung und das An-den- Randdrängen der nicht anglo-sächsischen Forschung (wie der Streit Montagnier/Gallo beim AIDS Virus). Die Monopolstellung des Wissens durch die Anglo-Amerikaner, die fast alleine entscheiden, was behalten, publiziert, genutzt werden soll (und die die wirtschaftlichen Früchte ernten). Die Endoktrinierung der Geister und die Einförmigkeit der Gedanken.

Wie kann man die wissenschaftliche Denkweise zurückerobern ?

Das erste Heilmittel hängt mit dem einfachen Menschenverstand zusammen : dass die Forscher in ihrer Muttersprache arbeiten und kommunizieren. Dazu braucht es die Unterstützung des Staates und der Forschungsanstalten, die Publikationen mit hoher Qualität bevorzugen und finanzieren sollen in den von den Forschern benutzten Sprachen.

Das zweite Heilmittel besteht in einer tiefgreifenden Änderung der Patentverfahren. Gegenüber einem amerikanischen Forscher, deren Patentierungskosten relativ bescheiden sind, muss der europäische Forscher eine gigantische Summe ausgeben. Es geht sogar soweit, dass Patente in ihrem Verlauf aufgegeben werden müssen (so in Caen geschehen vor ein paar Jahren) mangels finanzieller Mittel, Patente, die dann umgehend von den Amerikanern wieder aufgenommen und von ihnen genutzt werden.

Schließlich geht es darum, die Übersetzung von Artikeln und die wissenschaftlichen Konferenzen zu reaktivieren sowie andererseits die Mehrsprachigkeit zu fördern. Den Inhalt einer Ansprache in einer Fremdsprache zu verstehen ist einfacher, als sie in einer Sprache zu halten, die nicht die eigene ist.

Die Chancen, dass diese zwei Initiativen wirklich umgesetzt werden, sind leider gering.

So sagt Charles Durand (La mise en place des monopoles du savoir, L'Harmattan 2001), dass die europäischen Staaten sich vielleicht unwiederbringlich in einer „Rückwärts-Entwicklung“ befinden, von der sie weder den Mut noch den Willen haben, auszusteigen.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2012-2014

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono
2012	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2013	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Ĉekojn je la nomo de:

Mulhouse-Esperanto

CCP 19684 F Strasbourg.

Bazela Zamenhofa Festo

Fakte pro ne atendita okupiteco de nia kutima salono, ni elektis iri al nia proksima regiono :

Ni trafos nin **Sabate la 10.12.2011** je la **14a00** en la enirejo de la

VITRA DOM-PIRAMIDO en Weil am Rhein

Por la trajnvojaĝantoj : alveno en Weil je la ...

Por la aŭtomobilistoj : tra la Palmrain-ponto ĉiam longe de la ĉefstato
vi alvenas rekte en tiu loko

Por la Bazelanoj : buso Nr. 50 ? de la Claraplatz
antaŭ la preĝejo St. Clara

Programo (provizora) :

- 14a00 Mallonga enkonduko pri la Vitra-Piramido
- 14a15 Libera promenado tra la domo(j) (sen paga)
- 15a45 Kunveno por veturi al la restoracio Saigon-Palast
- 16a00 Kafumado
- 16a30 Prelego pri IBA Internacia Bau Ausstellung 2020
- 17a00 Prelego pri
- 17a30
- 18a00
- 18a30 Vespermanĝo

Bonvolu elekti menuon :

Prezo de la menuo : 15 eŭroj

- supo printempa volvaĵo salato
- C44 anasaĵo dolĉa-acida
- C43 anasaĵo „ok frandaĵoj“
- C35 Kokinaĵo chop suey
- C117 San-Vhirm (diversaj viandoj) en speciala saŭco kaj legomoj
- C82 fiŝfileo bakita dolĉa-acida saŭco
- C62 porka viando laŭ Szechuan-maniero (spica)
- V17 Mi-Cang Tofuo kun diversaj legomoj en kareo (saŭco tre spica)
- 1 glaciaĵo-globo kafo/espreso frukta miksaĵo

Familia nomo :**Individua nomo** : **Tel** :**Adreso** :

.....

Dato : **Subskribo** :

Aliĝon bonvolu sendi al : Esperanto Societo Basel, Postfach 178, 4005 Basel

Focke-Inzlingen@t-online.de

Antaŭpago al konto : PC 40-33714-4 Esperanto Societo Basel

supo printempa volvaĵo salato**C44 Ente süß-sauer****C43 Ente „Acht Kosbarkeiten“****C35 Hühnerbrust chop suey****C117 San-Vhirm (verschied.Fleisch) in spezieller soße und Gemüse****C82 Fischfilet gebraten in süß-sauer Soße****C62 Schweinefleisch nach Szechuan****V17 Mi-Cang Tofu mit verschied.Gemüse in Curry Soße(scharf)****1 Kugel Eis Kaffee/Espresso Früchte Cocktail**

Budo ĉe EcoBio-foiro en Hégenheim

Dankon kaj gratulon al Anne Vernet , kiu iniciatis partoprenon ĉe Eco-Bio foiro en Hégenheim, dimanĉe, la 2an de oktobro. Tie, ŝi lastmomente sukcesis havi lokon pro rezigno de alia asocio.

Ni duope deĵoris de la 9a ĝis la 18a. Ni informis kelkdekojn da interesatoj. Iuj eĉ spontane promesis, viziti nian kurson, kiu ekis la 5an de oktobro. Bedaŭrinde promeso, ĝi restis, ĉar neniu el la foir-vizitantoj finfine aperis. Tamen tiaj informbudoj estas ĉiam interesa sperto por ni, deĵorantoj. La reagoj de vizitantoj estas plej ofte pozitivaj, kelkaj asertas ke la ideo plaĉas, ke iam ili eklernos.

Nu, ni havu paciencon. Certe oni revidos nin en Hégenheim, ĉar ankaŭ la organizantoj estis ege akceptemaj. Ili eĉ sugestis, ke ni prelegu pri Esperanto. Tion ni tutcerte faros venontjare. Se ni, esperantistoj ne informus, kiu farus ĝin?

La prezentaĵo sur la ekrano estas alia bona ideo de Anne.

Ni ellaboris ĝin dum la tuta sabata postagmezo.

Esperanto en Espace 110

Wesserling "Libro-Festo"



ESPERANTO

ADULTES, ADOLESCENTS (16 ANS ET +)

André GROSSMANN

Venez découvrir une langue vivante, pratiquée à travers le monde par de nombreuses personnes. Rapidement accessible à tous, précis, nuancé, adaptable aux évolutions des techniques et des pensées, l'espéranto est un outil d'échange très efficace entre toutes les cultures. Une grammaire sans exception, sans verbe irrégulier. De plus en plus de sites esperanto sur internet, pour apprendre, pour s'informer, pour communiquer et se comprendre.

Mardi : 18h30 à 20h Débutants

Jeuvi : 18h30 à 20h Avancés

1^{er} contact : Mardi 20 septembre à 18h30

La Esperanto-kurso por progresantoj jam komenciĝis en Espace 110 marde la 20an kun ĉiuj lernantoj de la lasta jaro.

Ni uzas la librojn el la serio "Katrina"

La kurso por komencantoj ankoraŭ ne povis komenciĝi pro manko de lernantoj. Ni provos ĝin funkciigi en novembro eble jaŭde aŭ merkrede.

Nova lernojaro en Village-Neuf

Dum unu nia lunda kunveno Jacques PINEDA menciis, ke li jam prelegis pri Esperanto en alzaclingva rondo en Mulhouse. Tiam aperis la ideo, ke li prezentos ankaŭ nian aferon en Village-Neuf. Tuj proponita, tuj akceptita. Kiam mi parolis pri Jacques ĉe la kultura servo de la urbestrejo, mi konstatis, ke li estis jam fame konata. Verŝajne tial ili nin efoje majstre subtenis. Ili ellaboris kaj presis 1700 flugfoliojn, por ĉiu leterkesto de la vilaĝo. Deke da afiŝoj pendis en la montrofenestroj de la diversaj vendejoj. Ankaŭ ili rilatis kun la regionaj gazetoj kaj aperigis artikolojn pri la evento. Je la vespero de 28a de septembro ĉeestis Marie-Christine HOFER, vic-urbestro, respondeculino pri la kulturaj servoj kaj la sekretariino Marie-Louise CERCE. Sed, sed nur aperis kvar aŭskultantoj eksteraj kaj du jam samlingvanoj, Anne VERNET kaj Antoine SIMON. Malgrande eĥis, nia impona varbado. Finfine tamen aliĝis du lernantinoj al la kurso. Post tri lecionoj oni povas eĉ konstati, ke ili vigle lernadas. Tamen bona rezulto, ĉu ne?

Al ĉiuj partoprenantoj kaj subtenantoj, niaj elkoraj dankesprimoj.

Dimanĉe matene, la 25-an de Septembro 2011, Roberto KUENY, instalis etan, bonege lokitan budon en la ĉiujara **Festo de la libroj** en Wesserling : ĝi troviĝis apud la enirejo, ĉiuj vizitantoj pasis antaŭ ĝi kaj du centoj ricevis kalendareton. Multaj informiĝis kaj subskribis la peticion, kies afiŝo estis ege bone videbla ! Kiam mi alvenis por kundeĵori, jam multis la vizitanto.

Anekdot : salutis nin juna studentino el Bialistoko kaj pli poste eksa studentino de Pierre JANTON , kiu estis sekvinta kursojn en la universitato de Clermont-Ferrand. Sur la foto videblas Roberto

La Fadenoj de niaj lundoj

Bernard Behra proponis por niaj lundaj babil-kunvenoj la nomon "La Fadeno". Jen resume iom el liaj klarigoj.

Malgraŭ profesia okupiteco, mi decidis partopreni la babil-kunvenon okazonta lunde en Restoracio en Saint-Louis. Ja necesas iom pli da libereco por ĝui Esperanton, kiu cetere mankis al mi dum la somero.

Krome en la antaŭa dimanĉe-posttagmezo mi promenis kaj vizitis interalie la biologian foiron de Hégenheim. Surprize tie mi malkovris budon pri Esperanto kaj renkontis Anne Vernet kaj Bertrand Wick, kiuj majstre deĵoris ĉe tiu budo. Mi gratulis ilin kaj rendezujis por la morgaŭa lunda konversacia kunveno. Jam en la antaŭa dimanĉo Roberto deĵoris en Wesserling, tial preskaŭ ĉiu-dimanĉe Esperanto estas videbla en Alta-Alzaco. Brave.

Dum tiu lunda kunveno estis 8 partoprenantoj el kiuj 4 mi vidis unufoje. Tuj ni nur parolis esperante. Vera ba-



Hégenheim

bilado inter amikoj parolante pri esperantaj eventoj, agadoj kaj pri diversaj temoj.

Do mi serene travivis la kunvenon, kaj ĝi estis por mi la okazo renkonti samideanojn kaj provi paroli la lingvon (perdi la timon paroli ĝin) kaj progresi sur la vojo al flua parolkapablo. Tamen ni reciproke atentis esti bone komprenataj, kaj se ni ne trovis la vorton por io, la aliaj afable faris proponojn.

Mi legis ke oni serĉas nomon por la lundaj konversaciaj kunvenoj. Mi pensis pri "La Fadenon". Fadenon estas mal-

dika, multe pli longa ol dika produktaĵo el kuntorditaj fibroj, uzata por kudrado, trikado aŭ teksado. La celo de tiuj konversaciaj kunvenoj estas ne perdi aŭ plifortigi la fadenon inter ni kaj nia ligo kun Esperanto, ĉu ne? Ni povus diri, ke nia amo por Esperanto interligas nin per neŝirebla fadenon. Tiu fadenon estas aranea, malforta delikata, rompebla, kiel la fadenon de la vivo. Do Fadenon postulas nian atenton kaj zorgon.

Fakte fadenon, simbolece estas riĉa vorto. Esence la fadenon estas la faktoro, kiu kunligas ĉiujn statojn de la ekzistado inter ili kaj al ĝia principo. La fadenon kiu kunligas/bindas tiun mondon kaj la alian mondon, ĉiujn homojn. Temas ankaŭ pri la marionetoj, do la fadenpupoj, do iliaj fadenoj, kiuj interligas la marionetojn al la centra volo, kiu animas ilin (iu tiras la fadenojn!). Ni estas homoj ne marionetoj, do ni devas provi tiri/regi/elekti mem la fadenojn de nia propra vivo. Do fine lunda konversacia kunveno estas ankaŭ stacio sur la vojo de la filozofoj.

Venontaj Fadenoj

Niaj Fadenoj donos al vi la eblecon uzi Esperanton en amika rondo en simplaj konversacioj. Ne temas pri kurso, sed pri la ebleco profiti la okazon uzi kaj ĝui la lingvon por ne perdi la kontakton, ne perdi la fadenon kun la lingvo. Jam nun rezervu la jenajn lundojn:

24a de oktobro en Mulhouse
28a de novembro Saint Louis
30a de januaro Mulhouse
27a de februaro Saint Louis

Nia Biblioteko:

Eblas rete konsulti la libro-liston de nia biblioteko kaj profiti la okazon de tiuj kunvenoj por ilin prunte-ricevi. Sendu vian peton al la dissendo-listo.

26a de marto Mulhouse
30a de aprilo Saint Louis
31a de majo Mulhouse
25a de junio Saint Louis

En Mulhouse: la kunvenoj okazos en **la kafejo "le Printemps"**
7 rue du printemps 68100 Mulhouse.

En Saint-Louis: la kunvenoj okazos en **Restaurant de la Poste,**
10 rue de Huningue, 68300 Saint-Louis

Universala Kongreso en Kopenhago julio 2011

Ĉeestis ankaŭ Roberto Kueny,
jen lia raporto

Saluton al la legantoj de SRK.

Tion vi scias, ke okazis ĉi-jare 2011, fine de julio. Mi dirus ke, kiel kutime, estis "tradicia" kongreso, tradiciaj temoj, konferencoj. La kongresejo estis tre moderna, vasta, do agrabla, multaj tre taŭgaj salonoj! Okazis la ebleco tagmanĝi bonajn pladojn, preparitajn de franca kuiristo. . . . edziĝinta al Danino! Sen probleme oni povis frandi freŝan danbieron, . . . kion mi ŝatis!

Mi alvenis al Kopenhago per la trajno. Mi ŝatas tiun vojaĝ-rimedon, ĉar en la kupeo mem, mi jam povas paroli pri Esperanto kun la aliaj vojaĝantoj! Rapida trajnado de DE- Freiburgo al Kopenhago.

Loĝado? Sufiĉe da hoteloj certe, sed dependas la situacio! Ĉar la kongresejo troviĝis en la cirkaŭaĵo de la ĉefurbo, almenaŭ kvar km-oj de la centro de la malnova urbo. Aŭ se vi ne estas "ĝenita" mone, apud troviĝas luksa, vasta, super-moderna, nova hotelo.

La vetur-komunikado per buso, de la stacidomo al la kongresejo estis facila! Post vizito al la akceptejo de la kongresejo, mi decidis atingi mian hotelon piede, pensante ke ĝi estas proksima laŭ la mapo! . . .

Kiam ekpluvegis, kaj post duon-horo da marŝado, mi estis malsekega ĝis-oste! Cetere, duan fojon en la semajno mi estis "saŭc-igita" vespere ĉar mi ne



atentigis pri la fakto, ke ne ĉiuj busoj atingos mian hotelon! Kvankam, la vizito al la ĉefurbo, dum la libera tago, merkrede, bone disvolviĝis, ĉar hazarde estis sunbrila tago!

Aliaj eventoj? Por mi, renkontiĝo





de la konataj amikoj de la tuta mondo! Retrovo kun Aini el Finnlando, Rodika el Rumanio, Hamid el Irano, kaj. . . aliaj. Renkontiĝo kun la Nepalanoj, la Rusoj, kaj alia. . . Alzacano! Ha!. . . kiun mi ne konis!

Tamen, mi konas ĉiujn esperantistojn de mia departamento! Lunde vespere alparolis min (en Esperanto!) iu viro kiu konas min per la artikoloj en la "Informilo"!



"Mi nomiĝas Roberto kiel vi, naskiĝis en Uffholtz, parolas la alzacan(!)". Tri minutoj poste, ni diskutis en la alzaca (diskrete!), poste retrovis la "aliajn" sen krokodilado, trinkante bieron! La "nova" Roberto nun loĝas en la departamento "Haute-Savoie", . . . kaj mi jam vizitis lian domon, kiam ni, edzino kaj mi, feris en la regiono de Annecy!

Alia eventeto, ne kutima, kiun mi "frandis", estis la trairado de la ĉefurbo kun grandega banderolo, akompanata de centoj de esperantistoj; kiuj surmetis "japanan kaptukon" kun la nomo (en la dana) de la deven-uloj. Eventeto organizita de Mireille Grosjean (CH), kiun mi bone konas.

Bedaŭrinde, tiun tagon "ankaŭ" pluvis, ventis! Certe ni ne estis en Afriko!!

Entute do por mi, kontentiga etoso, denove "re-kaldron-iĝo" kiel mi ofte diras!

Via!

La 19-a Internacia Esperanto-Semajno de kulturo Kaj Turismo en Malgrat de Mar, Katalunio



Komence de oktobro 2011 okazis jam la 19-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, ĉi-foje pli norde de Barcelono en Malgrat de Mar. La vetero estis tute somera kun suno en blua ĉielo. Multaj partoprenantoj venas jaron post jaro al tiu aranĝo, aldoniĝas novaj partoprenantoj, kiuj malkovras la eblecon ĝui someron en oktobro en amika etoso. Ĉi-jare en la hotelo "Kartago Nova" la bufedaj manĝoj estis malpli ampleksaj kaj variaj ol en antaŭaj jaroj.

Maldensa programo ebligas ĝui la urbon, la proksiman strandon aŭ la hotelan naĝejon. En hotela salono okazis la inaŭguro de la semajno, dufoje interkona vespero kaj diversaj prelegoj. La Esperanto-kurso celis ĉefe komencintojn.





Urbo Sabadell

En la semajno okaze du duon-tagaj ekskursoj kaj unu tuttaga ekskurso al la urbo Sabadell. Tie ni vizitis la Paleontologian Muzeon, kie eblis admiri diversajn prabestojn, dinosaŭrojn. Sed aparte interesa kaj alloga estis fantazia prahomo ĉe la enirejo de la muzeo. Luj ĝin detale observis.

Jaŭde vespere la ensemblo "Els Rogers" plezurigis la publikon per siaj melodiaj kantoj kaj Havana Muziko. Dume ĉiuj partoprenantoj ricevis taseton kiel memoraĵon de tiu semajno, kaj ĝin plenigis plurfoje per "cremat" (rumo bruligita kun spicaĵoj).



En la Paleontologia Muzeo



Fotoj kaj raporto de Andreo

Krokodilado kaj interkompreniĝo

Bedaŭrinde la semajno estis ankaŭ infektita de terura viruso, nome krokodilado.

Luj hispanaj aŭ francaj rondoj estis plene infektitaj. Tie ne regis internacia interkompreniĝo, tie ne eblis ĝui la internacian lingvon, tiuj rondoj estis fermitaj al eksterlandanoj. Ili estis kvazaŭ la verukoj de la semajno.

Jam estas planoj okazigi venontjaran semajnon sude de Barcelono. Ne hezitu, tie estos somero eĉ en oktobro.

Subĉielo arta muzeo "Pedregar"

LA SAT-POSTKONGRESO EN HERCEGOVINO



Sabate la 6-an de aŭgusto finiĝis la 84-a SAT-kongreso en Sarajevo. Nur kvin gesamideanoj aliĝis al la postkongresaj ekskursoj. La programon organizis kaj gvidis Senad Ĉolić. Dum kvar tagoj ni ĝuis agrablan etoson vizitante interesajn lokojn en la bela suna Hercegovino. Antaŭ la forveturo al la nova aventuro ni unue piedpromenis tra platan-bordita aleo kondukanta al la fonto de la rivero Bosna. Revene ni uzis kaleson. La programo komenci-

ĝis postagmeze. Unue ni veturis al la lago Boračko, kie ni fiŝpiknikis ĉe la bordo de la rivero Neretva kaj poste ni vizitis la atraktivan urbon Konjic, kies ŝtona ponto el la 17-a jarcento estis detruita dum la dua mondmilito, sed denove rekonstruita en la jaro 2009.



Sekvan tagon, survoje al la urbeto Počitelj ni vizitis militan muzeon en Jablanica. Ekspozitaĵoj atestas pri batalo sur la rivero Neretva. Ekstere videblas restaĵoj de la detruita fervojponto. En Počitelj ni instaligis en komforta rezidejo por tranokti kaj poste ni promenis tra ŝtonpavumitaj stratetoj de la orient-stila urbeto el otomana epoko. Ĝin dominas horloĝturo, la moskeo (Hadži-Alijina džamija) kaj la mezepoka fortikaĵo el la 14-a jarcento. De tie estas bona panoramo al la rivero Neretva kaj vasta valo. La urbeto estas deklarita de Unesko kiel Monda heredaĵo. Survoje al la urbo Stolac ni haltis ĉe la nekropolo Radimlja por vidi mezepokajn tomboŝtonojn. En Stolac ni promenis laŭlonge de la rivero Bregava kaj poste vespermanĝis. Ĉiutage ni manĝis bongustegajn frititajn trutojn breditajn surloke.

Lunde nia grupeto admiris belan pejzaĝon en la natura rezervejo Hutovo Blato. Navigante tra kanalo sur boato ni observis netuŝitan naturon, kie nestas pluraj specoj de birdoj. Ĝi ankaŭ estas unika oazo por migrantaj birdoj, por pluraj specoj de fiŝoj kaj aliaj akvobestoj. Poste ni vojaĝis al la akvofalo Kravac, kie multaj homoj baniĝis kaj ĝuis malvarman akvon dum varmega tago. Ankaŭ niaj du kuraĝuloj re-



freŝiĝis. Agrabla estis renkontiĝo kun lokaj esperantistoj kiuj akompanis nin. Proksime de la mezepoka urbo Ljubuŝki ni vizitis franciskan muzeon.


Atraktiva estis ekskurso al Dubrovnik, famkonata urbo en Kroatio, situanta ĉe la Adriatika marbordo. Ĉiuj estis ravitaj pro ĝiaj pitoreskaj mallarĝaj stratetoj kaj romantikaj placetoj. Turistoj abundis. Revene ni haltis en la urbo Trebinje, kie ni renkontiĝis kun Simo Milojević, nuntempe loĝanta tie. Kun li ni pasigis agrablajn horojn manĝante en belstila restoracio ĉe la rivero Trebiŝnjica. Tiel finiĝis la postkongresa ekskursado tra suda parto de Hercegovino. Ĝi postlasis en ni belajn rememorojn. Koran dankon al nia gvidanto Senad pro la perfekta kaj plen-sukcesa aranĝo!

Liba Gabalda



Torino estis la unua ĉefurbo de Italio. Ĉi jare oni festis la 150-an jubileon de Italio. En la tuta lando flirtis hisitaj naciaj flagoj. Festantaj homamasoj kaj multaj turistoj venis por ĝui la eventon. Jam la kvaran fojon Torino gastigis la Italian E-Kongreson. Partoprenis ĝin pli ol 250 geesperantistoj el 30 landoj. Krom multaj eŭropanoj venis gesamideanoj el Indonezio, Brazilo, Madagaskaro, Israelo, Usono. Al la ĉeftemo “Kaj nun ni estu eŭropanoj” estis dediĉita unu el la du seminarioj. La Landa Kongresa Komitato preparis buntan kaj interesan semajnan programon kaj zorgis pri ĝia bona disvolviĝo. Tio efektive okazis. La solenan inaŭguron prezidis Renato Corsetti, bonvenigis nin la prezidanto de la torina Esperanto klubo, parolis skabenino de la urbo Torino. La senatano kaj urbestro de la venonta kongresurbo Mazara del Vallo invitis nin ĉeesti la 79-an Italian Kongreson okazonta en Sicilio. Tie oni intencas starigi Centron por Interkulturo kaj Esperanto. La ĉefan paroladon prezentis la prezidento de UEA Probal Dasgupta.

La kongreso okazis en Villa Gualino, kie estas hotelĉambroj kaj pluraj konferencejoj. De la hotelĉambro ni havis belan panoramon al la urbo Torino bordita per Alpmontaro. Bedaŭrinde, la montoj estis vualitaj per nuboj ĝis la antaŭlasta tago. En la unua kongresa tago okazis rande de la urbo Verda Foiro simile kiel dum la UK-oj. Du seminarioj, fakaj kunvenoj, prelegoj, KER-ekzamenoj, E-kursoj kaj lecionoj de la itala lingvo, publikaj diskutoj, prezentadoj de diversaj libroj kaj pluraj ekskursoj konsistigis la semajnan programon. Prelego pri Komenio vekis intereson kaj ankaŭ tiu pri “Zamenhof profeto



de Eŭropo” trovis siajn adeptojn malgraŭ malfrua noktohoru. Gejunuloj havis aldonan programon, infanoj lerte desegnis, modlis kaj poste instalis malgrandan ekspozicion.

Riĉ-enhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj. Kantis la kataluna muzikgrupo “Kaj Tiel Plu”, la litova familia bando Asorti, la itala profesia grupo Reverie, duopo Nane kaj Ankie



el Nederlando, la sveda gitaristo kaj kantisto Martin Wiese kaj la itala romantikulo Manuel Rovere, kiu ankaŭ prizorgis ĉiujn artistojn provizante ilin per sia aparataro. Dum la Internacia vespero prezentiĝis artistoj el niaj vicoj kantante, recitante poemojn, ludante violonon, pianon, kaj aliajn nekutimajn instrumentojn. Trupo de polaj junulinoj prezentis modernajn danckreaĵojn. Ĉio-ĉi estis interesa kaj bunta spektaklo. Al la kulturaj programeroj apartenis ankaŭ prezento de du teatraĵoj. Unu originale verkita de Mikaelo Bronŝtejn “Dek tagoj de kapitano Postnikov” estis adaptita kaj prezentita de Saŝa Filipoviĉ kun aliaj du aktoroj. La dua (tradukita) teatraĵo temis pri “Roma Triptiko”. Ĝi impresis iom mistere. Oni prezentis ankaŭ la filmon de Roman Dobrzinsky “Japana printempo”, kiu gajnis la unuan premion en Belartaj Konkursoj. Ne malpli plaĉa estis la filmo pri Odeso kaj bildoj pri odesaj katakomboj, kiujn prezentis Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

Interesaj estis bildoj kaj libro pri Bona Espero en Brazilo, prezentita de la italbrazila paro Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia.



Pri la evento interesiĝis ankaŭ politikistoj (kun favora sinteno al Esperanto), ĵurnalistoj, televido kaj aperis kelkaj artikoloj en la loka gazeto. En TTT-paĝoj estis aperigitaj freŝaj novaĵoj. Por la kongreso estis pretigitaj du specialaj bildkartoj, kiujn oni povis stampigi per poŝta memorstampo.

Dum la ĉi-jara Itala Kongreso estis elektita nova estraro de la asocio. Ĉe la fino de la kongreso la sekretariino Laura Brazzabeni dankis ĉiujn ĉeestantojn pro ilia partopreno kaj fermis la kongreson. Venotjare oni atendas ankoraŭ pli da partoprenantoj en la bela varma Sicilio. Surloke jam aliĝis pli ol 50 gesamideanoj. Aliĝu ankaŭ vi kaj ĝuu la varman etoson en Sicilio!

Liba Gabalda


70a Regiona Staĝo de Esperanto

organizita
de

MULHOUSE  ESPERANTO

Por

En amikaj rilatoj kun
BAVELO



23 / 24 / 25-ajn de marto 2012

En la Feriejo Ambroise Croizat 37, rue d'Ingwiller
67290 LA PETITE PIERRE



Prelegoj de Tomasz
CHMIELIK

Distra
vespero
Manuel el
Italio



Manuel

KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

C: Progresantoj :
paroliga kurso tute en esperanto.

D: Seminario:
Tomasz CHMIELIK el Pollando



Aliĝo kaj pliaj informoj:
Bertrand WICK, 71b, rue du Général de Gaulle,
FR-68128 Village-Neuf
bwick@laposte.net
Tel.+33 3 89 69 86 42 +33 9 75 69
32 93 +33 6 08 71 72 92

Provizora Programo:

Vendrede 23an de MARTO 2012

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Interkonatiĝo
- 21a45 Knajpo malfermita.

Sabate 24an de marto 2012

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado en La Petite Pierre
- 12a Reveno al la domo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, C, D Prelegaro
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 MANUEL kantos por ni !
- Poste : knajpo

Dimanĉe 25an de marto 2012

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, D Prelegaro
- 12a30 Tagmanĝo

Bonvolu sendi la dorsan aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

Bertrand WICK
71b, rue du Général de Gaulle
68128 VILLAGE-NEUF

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de:

Bertrand WICK

Naciaj ĝiroj al **CCP 507 18 N**

STRASBOURG

Internaciaj ĝiroj al

Bertrand WICK: IBAN:

FR60 2004 1010 1500 5071 8N03 675

BIC: PSSTFRPPSTR

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.

(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen

- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Vizito al muzeo en Petite Pierre
- Poste : disiĝo

ALIĜOJ

	Antaŭ la 1a de februaro 2012	Post la 1a de februaro 2012
Ĉef-aliĝanto jam abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"	35 €	40 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	15 €	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	2 €	4 €

Restado-kostoj

Nombro da personoj en unu ĉambro	1	2	3	4	6
1 tranokto + matenmanĝo	47 €	34 €	32€	30 €	
Duon-pensio: 1 nokto + matenmanĝo + 1 manĝo	63 €	50 €	48€	46 €	42 €
Kompleta pensio (1 tranokto + 3 manĝoj)	73 €	60 €	58€	56 €	52 €
Apartaj manĝoj 16 €					

Aliĝilo por la 70a Regiona Staĝo de Esperanto en LA PETITE PIERRE la 23/24/25ajn de marto 2012

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ-kotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
4					
Adreso					

Numero da manĝoj kaj da tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranoktado : nombro da personoj			
Ĉambro: indiku vian preferon	1-lita 4-lita	2-lita 6-lita	3-lita

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Telefono:	Ret-adreso:
-----------	-------------

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: al Bertrand WICK per ĉeko per ĝiro
per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio
Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

Nia Kalendaro 2011-2012

Oktobro 2011	11 - 18 - 25aj 19aj	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Eble kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
Novembro 2011	8 - 15 - 22 - 29aj 9 - 16 - 23 - 30aj 19 - 20 a	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Eble Kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Ni havos tablojn ĉe la foiro " Festival Eco/Equitable " en Ungersheim. Ni invitas vin kune deĵori
Decembro 2011	6 - 13aj 10a	Kursoj por Progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Zamenhof-festo organizita de la Bazela Grupo en Weil am Rhein.
Januaro 2012	10a 17 - 24 - 31aj	Ni kune festos la tri-reĝojn en nia kursejo en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a. Kursoj por Progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
Februaro 2012	7a 14 - 21 - 28aj	Kunveno kaj Ĝenerala asembleo en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

Fotoj el la postkongreso en Oslo

